# Esperanto aktuell 267

40. Jahr (2021) №3 (267)

Informationen fűr Esperantofreunde in Deutschland und Ősterreich



Malnova urbodomo en Oldenburg, kie oni planas okazigi la venontan GEK. Interkultura Centro Herzberg am Harz: Programo. Alvoko por konstruado de "Internacia Esperanto-monumento" en la Esperanto-urbo. Kiel apogi nian lingvon kadre de Eŭropa Unio? PSI-eto = malgranda Printempa Semajno Internacia. Kune: Raportetoj de KEKSOanoj. Studoj pri Esperanto: Interlingvistikaj Studoj de AMU.

## Deutscher Esperanto-Bund e.V.
## Germana Esperanto-Asocio r.a.

Amtsgericht Berlin VR 13651 B
*www.esperanto.de/deb* (Netzpräsenz)

**Bankokonto** (por membrokotizoj kaj donacoj) / **Bankverbindung** (für Mitgliedsbeiträge und Spenden): HELADEF1ERB, Sparkasse Odenwaldkreis, DE 3250 8519 5200 4011 4571. Spenden und Mitgliedsbeiträge für den D.E.B. sind steuerlich abzugsfähig.

**Oficejo / Geschäftsstelle: Esperanto-Laden**
Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,
Leitung: ***Sibylle Bauer***
030 / 5106 2935, 0800 336 3636
Fax: 030 / 4193 5413
*sibylle.bauer@esperanto.de*

**Membroprizorgado / Mitgliederbetreuung**
DEB: 0800 - 3 36 36 36 – 21
DEJ: 0800 - 3 36 36 36 – 22

**Briefpost** senden Sie bitte, soweit keine andere Anschrift angegeben, an die Geschäftsstelle. Sie wird von dort elektronisch weitergeleitet. Die angegebenen **Telefon-Durchwahlnummern** sind nach der Rufnummer **0800 - 3 36 36 36** zu wählen.

## Estraro GEA / Vorstand DEB

**Netzpost** an / retmesaĝo al *gea.fe@esperanto.de*
Jedes Vorstandsmitglied ist individuell erreichbar per E-Post-Adresse in der Form *vorname.name@esperanto.de*.

**Prezidanto / Vorsitzender**
***Ulrich Brandenburg,*** Durchwahl: -5111
*gea.prezidanto@esperanto.de*

**Vicprezidanto / Stellv. Vorsitzender**
***Andreas Emmerich,*** Durchwahl: -5112

**Trezoristo / Kassenwart**
***D-ro Matthias Hecking,*** Durchwahl: -5113

**Sekretario / Schriftführer**
*Nils Brinkmann, Durchwahl -5125*

**Landaj ligoj / Landesverbände**
***Wolfgang Bohr,*** Durchwahl: -5114

**Administrado / Verwaltung**
***Barbara Brandenburg***

**Publika agado kaj pliklerigado / Öffentlichkeitsarbeit und Weiterbildung**
***Oliver Walz,*** Durchwahl: -5116

**Kongresoj kaj renkontiĝoj / Kongresse und Treffen**
***Andreas Diemel,*** Durchwahl: -5120

**Informteknologioj/Informationstechnologie**
***Franz Kruse,*** Durchwahl: -5119

**Jugendvertreterin / GEJ-komisiito**
***Michael Vrazitulis,*** Durchwahl: -5118

**Germana Esperanto-Junularo / Deutsche Esperanto-Jugend**
***Michael Vrazitulis,*** Durchwahl: -5211
*michael.vrazitulis@esperanto.de*

### Komisiitoj / Beauftragte

*esperanto.de/deb/beauftragte*

**Gazetaraj kaj publikaj aferoj /Presse und Öffentlichkeitsarbeit**
***Louis von Wunsch-Rolshoven,***
Durchwahl: -111 • Fax Durchwahl: -112
*louis.von.wunsch-rolshoven@esperanto.de*

**Komisiito por retaj kunvenoj / Beauftragter für virtuelle Treffen *Heinz-Wilhelm Sprick,***
*gea.zoom@esperanto.de, tel. 0800-3363636-5128*

**Komisiito por rondvojaĝoj/ Rundreisen,**
Durchwahl -5123
***Uli Ender,*** *uli.ender@esperanto.de*

**Informmaterialo/Informationsmaterial**
Goar Engeländer, Durchwahl: -5127
*goar.engelaender@esperanto.de*

**Medienecho**
***Hermann Kroppenberg***, Durchwahl: -5121
*medienecho@esperanto.de*

**Libroservo / Bücherdienst**
D-ro / Dr. ***Wolfgang Schwanzer***,
Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz,
Durchwahl: -5122, *buchversand@esperanto.de, www.esperanto.de/buchversand*

**Komisiito Interreta Redaktado / Beauftragter Internetredaktion**
***Thomas Bormann,*** Durchwahl: -5117
*thomas.bormann@esperanto.de*

### Pliaj adresoj / Weitere Adressen

**Germana Esperanto-Junularo (GEJ) / Deutsche Esperanto-Jugend (DEJ)**
Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,
030/4285 7899, Fax: 030/4193 5412
*www.esperanto.de/gej* (Netzpräsenz)

**Interkultura Centro Herzberg (ICH) / Bildungszentrum des D.E.B.**
Komisiitoj/Beauftragte: ***Zsófia Kóródy*** (instruado), ***Peter Zilvar*** (klerigado kaj kulturo), Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg, die Esperanto-Stadt, 05521/5983, Fax (05521) 1363, Durchwahlen: -411 (Tel), -412 (Fax), *ich@esperanto.de, www.esperanto.de/ich*

**Germana Esperanto-Instituto / Deutsches Esperanto-Institut**
Prof. D-ro/Dr. ***Martin Haase***, Lehrstuhl für Romanische Sprachwissenschaft,
Uni Bamberg, Durchwahlen: -431 (Tel), -432 (Fax), *martin.haase@esperanto.de, www.esperanto.de/dei*

**Germana Esperanto-Biblioteko / Deutsche Esperanto-Bibliothek**
p/a. ***Karl Heinz Schaeffer,*** Schulstr. 17, 73432 Aalen, Durchwahlen: -421 (Tel), -422 (Fax)
*biblioteko@esperanto-aalen.de*
*bibliothek-aalen@esperanto.de*
*www.esperanto.de/bibliothek*

**Fondaĵo FAME / FAME-Stiftung**
***Andreas Emmerich,*** *estraro@fame-stiftung.de* (nur por FAME)

**Stiftung Mondo**
Hauptstr. 42, 64753 Brombachtal,
030/6920 4846-1, *stiftungmondo@gmail.com,*
Bankkonto: 151100004, Volksbank Stuttgart eG, BLZ 600 901 00.
Spenden sind steuerlich abzugsfähig.

### Aŭstria Esperanto-Federacio / Österreichischer Esperanto-Verband

*aef@esperanto.at, www.esperanto.at*

**Aŭstria Esperanto-Junularo / Österreichische Esperanto-Jugend**
Weissgerberlände 30-36/5/11, 1030 Wien,
*aej@esperanto.at, http://aej.esperanto.at*

**Esperantomuzeo Vieno / Esperantomuseum Wien**
Palais Mollard, Herrengasse 9, 1010 Wien, +43/1/53410-731, Postanschrift: Österreichische Nationalbibliothek, Josefsplatz 1, Postfach 25, 1015 Wien, *plansprachen@onb.ac.at, www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm*

**UEA-ĉefdelegitoj kaj perantoj / Bundesbeauftragte des Esperanto-Weltbundes UEA**

**Germanio / Deutschland**
D-ro / Dr. ***Wolfgang Schwanzer***, Adressen siehe mittlere Spalte: Libroservo/Bücherdienst

**Aŭstrio / Österreich**
***Leopold Patek,*** Martinstr. 104/38,
3400 Klosterneuburg, Poŝtel.
+43/66473611289,
*aon.913548977@aon.at*

***Esperanto aktuell***
ISSN 0942-024 X

**Eldonisto / Herausgeber**
Deutscher Esperanto-Bund e.V.,
der Vorsitzende (v.i.S.d.P.)

**Redaktista teamo / Redaktion:**
***Stano Marček*** (Martin/Slovakio),
***Yashovardhan Singh***, Im Johannistal 23,
42119 Wuppertal. Durchwahl: -54

**Kunlaborantoj / feste Beiträger:**
***Hermann Kroppenberg*** (Medienecho),
***Utho Maier*** (Bibliotheken), Peter Zilvar (ICH)

**Presejo / Druck**
Alfaprint, Martin, Slovakio

*Esperanto aktuell* kun *-kune-* havas ses numerojn jare kaj estas abonebla ĉe la oficejo (vidu maldekstre supre) por 19 € (de eksterlando: 25 €) jare.
*Esperanto aktuell* mit *-kune-* erscheint sechs Mal pro Jahr. Abonnierbar bei der Mitgliederbetreuung (s.o.). Abonnement: 19 € (Ausland: 25 €) jährlich; für ordentliche Mitglieder im Beitrag enthalten.

**Anoncoj / Anzeigen:**
Skribu al / Schreiben Sie an: *deb@esperanto.de*

**Kontribuoj / Beiträge**
Bv. sendi viajn kontribuojn (en formato *.doc a.s.) al *ea@esperanto.de*, por n-ro 2021/4 ĝis la 15-a de julio 2021. Paperaj kontribuoj nur esceptkaze, tiam al Yashovardhan Singh (vidu supre). Senden Sie Ihre Beiträge bitte (im Format *.doc o.ä.) an *ea@esperanto.de*, für Nr. 2021/3 bis zum 15. Juli 2021. Papierbeiträge nur im Ausnahmefall, dann an Yashovardhan (s.o.).



# Karaj legantoj,

tiu ĉi eldono de *Esperanto aktuell* atingos vin iom pli malfrue ol kutime. Ni volis atendi la rezultojn de la virtuala Transponta Kongreso, kiun GEA organizis kune kun Pola Esperanto-Asocio kaj la fervojista asocio IFEF. GEA jam longe praktikas retajn estrarkunsidojn kaj – sekve de la pandemio – devis virtualigi plurajn el siaj tradiciaj renkontiĝoj. Ankaŭ pluraj el niaj grupoj movis siajn kunvenojn en la virtualan spacon, kelkaj tre sukcese kun partoprenantoj el la tuta mondo. Sed la kongreso estis aparta defio: tritaga programo de mateno ĝis vespero, tri organizantaj asocioj kaj ĝis tri paralelaj sesioj en la "subĉambroj". La teknologio jam estas bona, sed labori per ĝi postulis konstantan prizorgadon kaj konsiladon, por kiu ni starigis apartan Zoom-teamon sub gvido de Heinz Sprick. Finfine la afero funkciis, kaj ni havis pli ol 330 partoprenantojn – certe pli ol estus venintaj al ĉeesta kongreso.

Ni sukcesis savi la temon "najbaroj", kiun kvazaŭ simbolas la ponto en nia kongresa emblemo. Tre bone ilustris la temon prelegoj de Ulrich Lins, Goro Kimura, Zosia Smistek kaj Seán Ó Riain: pri la kontribuo de esperantistoj al pol-germana interproksimiĝo, pri la lingvaj apartaĵoj de la apudlima regiono ĉirkaŭ Frankfurt (Oder), pri la historia renkontiĝo Kohl/Mazowiecki en Słubice kaj pri la najbaraj rilatoj sur la irlanda insulo. Preskaŭ forgesitan epokon de la Esperanto-historio memorigis Roman Dobrzyński, parolante pri la opero "Halka", prezentita en Esperanto dum la Krakova UK en 1912. Pluraj aliaj programeroj pritraktis la limregionon kaj anstataŭigis la ekskursojn, konatajn de ĉeestaj kongresoj. IFEF ofertis tutan serion de fervojistaj fakprelegoj. Aldoniĝis al la programo tri prelegoj el la kadro de la Akademio Internacia de Sciencoj (AIS): Amri Wandel pri "nigraj truoj", Ida Stria pri nordĝermanaj lingvoj kaj Anna Striganova pri fabeloj. Mi ne forgesu ankaŭ la muzikajn programerojn: koncertojn de ĴeLe, de Jonny M., de Marek Nahajowski, de Georgo Handzlik, de Frey Lech Trio el Bialystok, de JoMo kaj de la itala kantistino Kjara. Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) okazigis sian jaran asembleon en la kadro de la kongreso, kunvenis esperantistaj verduloj kaj AGEI/ILEI. GEA kaj PEA okazigis renkontiĝojn kun siaj membroj, IFEF kunvenigis sian komitaton. Kaj la kongresanoj povis inter si komuniki per la (skriba) babilejo kaj ĉeesto en virtuala kafejo. Grandan dankon al ĉiuj kontribuintoj!

Sufiĉe multo do sukcesis. Sed por tio la kongresanoj devis pasigi dekojn da horoj preskaŭ senmove antaŭ la komputila ekrano. Mankis ŝancoj por personaj renkontiĝoj kaj neformalaj kontaktoj, mankis la loka atmosfero, la ekskursoj kaj ankaŭ iom la publika atento: virtuala kongreso okazas ĉie kaj nenie. Salutvortoj venis de la ministroprezidanto Woidke, de la pola kaj la germana ambasadoroj, de la ĉefurbestro de Frankfurt (Oder) kaj la ĉefoj de la fervojistaj kulturaj asocioj internacia kaj germana. Je tiu nivelo do la atento estis bona kaj eble helpos por la estonteco (kaj denove multan dankon al la Fonduso por German-Pola Kunlaboro pro la financa subteno!). Sed virtuala kongreso ne donas bonan okazon por surloka publika aktiveco kaj informa laboro, bedaŭrinde. Ofte mi do aŭdis la esperon, ke ni baldaŭ povu reveni al normaleco. La venonta GEA-kongreso en Oldenburg estu ĉeesta, kaj la preparoj aspektas tre bone. Pri ĝi vi verŝajne legos aliloke en ĉi tiu revuo.

Mi volas mencii ankoraŭ temon pritraktitan precipe dum la EEU-kunveno. La "Konferenco pri la Estonteco de Eŭropo", formale lanĉita de la Eŭropa Unio la 9-an de majo 2021, enhavas ankaŭ elementon de publika konsultado. Detalojn priskribas la kontribuo de Klaus Leith en ĉi tiu eldono. Ni ne dum momento faru al ni iluziojn pri la karaktero de tiu konsultado, sed: en ĝi malgraŭ ĉiu reklamo verŝajne partoprenos relative malmultaj el la 450 milionoj da eŭropaj civitanoj. Trovi atenton por Esperanto do estos relative pli facile ol en aliaj medioj. Mi tial petas vin partopreni en la konsultado kaj subteni la proponojn favorajn al lingva egalrajteco kaj la uzo de neŭtrala lingvo kiel Esperanto. Sekvos pliaj etapoj en tiu konsultado, kiu daŭru dum unu jaro. Ni klopodu ankaŭ tie partopreni. Bonajn argumentojn ni havas.

Amikajn salutojn

**Ulrich Brandenburg**

# Enhavtabelo/Inhalt


**1:** Malnova urbodomo en Oldenburg, kie oni planas okazigi la venontan GEK.

**2: Adresoj.**

**3: Germana Esperanto-Asocio:** Karaj legantoj. Enhavo.

**04-06: Interkultura Centro Herzberg:** Pri nia konstanta gazetara laborado kaj publikaj rilatoj. ICH Herzberg am Harz ... – la Esperanto-urbo: Programo. Alvoko por konstruado de "Internacia Esperanto-monumento" en la Esperanto-urbo.

**07-08: Aŭstria Esperanto-Federacio:** Neue Webseiten des Österreichischen EsperantoVerbands.

**09-10: Publika agado:** Kiel apogi nian lingvon kadre de Eŭropa Unio?

**11: Historio:** Esperanto im Gebrauch der Nazipropaganda im Kriegsjahr 1942.

**12-14: Medienecho**

**15-17: Germana Esperanto-Asocio:** PSI-eto = kleine Internationale Frühlingswoche. PSI-eto = malgranda Printempa Semajno Internacia.

**18-20: El bibliotekoj kaj arkivoj:** Folge 60 – Eine Neugründung in Belgien: Internationales Esperanto-Archiv IEspa. Nova Internacia Esperanto-Arkivo por eterne konservi la originalan Esperanto-heredaĵon.

**20:** Letero de la leganto.

**21: El la fakaj ligoj:** Esperanto muss leben! Esperanto devas vivi!

**22-24: Lingvaj minoritatoj:** La reĝo de serpentoj. *Lutki*: fabelaj hometoj el la Spree-arbaro. La soraba akvoviro. Legendoj el Bavario.

**25-30: ·kune· – revueto de Germana Esperanto-Junularo:** Raportetoj de KEKSOanoj. Malnovaĵoj de GEJ... – kaj aliĝu al JES! Al la 12 partoprenantoj la unua reta KEKSO tre plaĉis! Kvin veganaj receptoj. Pri mia vivstilo, klimatprotektado kaj ligo al Esperanto-movado.

**31: Studoj pri Esperanto:** Interlingvistikaj Studoj de AMU. Esperanto-enketo por mia faklaboro.

**32:** Fotoj el Interlingvistikaj Studoj en AMU, Poznano (Pollando).

# Pri nia konstanta gazetara laborado kaj publikaj rilatoj

**Post pli ol kvardekjara informado kaj gazetara laboro en Herzberg am Harz kaj en la regiono ni pretigis tiun ĉi resumon pri faritaĵoj kaj fareblaĵoj en tiu ĉi tereno.**



## Publikaj rilatoj kaj gazetaro

Ĉirkaŭ la jaro 1968 la konata Esperanto-aktivulo kaj longjara GEFA- kaj IFEF-prezidanto Joachim Gießner translokiĝis de Braunschweig (Brunsviko) al Herzberg am Harz. Tuj li ofertis Esperanto-kursojn por komencantoj en la instrusalono de la stacidomo kaj verkis artikolojn por la regiona gazeto *Harzkurier*, ekzemple pri aktivecoj ĉe kongresoj. Kuraĝe li kontaktis la lokajn politikistojn kaj informis pri Esperanto.

De la mezo de la sepdekaj jaroj de la lasta jarcento nia regiona Esperanto-asocio „Esperanto-Gesellschaft Südharz“ regule informis pri aktivecoj, interesaj eksterlandaj gastoj, kursofertoj, ktp. Same ni ekkontaktis lokajn politikistojn, informis gazetojn eĉ en la regiono kaj sporade ekzemple en la tuta federacia lando Malsupra Saksio pri niaj kurs- kaj klerigofertoj.

Okaze de kongresorganizadoj ni kontaktis ekzemple DPA (Germana Gazetara Agentejo). Unu el la plej memorindaj atingaĵoj estis la ampleksa tutlanda gazetara informado okaze de la jubilea Germana Esperanto-Kongreso en 2006 en Braunschweig. Eĉ la urbestro de Esperanto-urbo Herzberg aktive partoprenis.




## Televido kaj radio

Entute sesfoje ni povis allogi diversajn televidoprogramojn al Herzberg. Kelkfoje filmis NDR el Hanovro, foje RTL kaj MDR (Außenseiter-Spitzenreiter kun la konata s-ro H. J. Wolfram) kaj plurfoje okazis ankaŭ radiointervjuoj. Tiuj bele dokumentas, ke almenaŭ en iu urbeto kaj en la ĉirkaŭanta sudharca regiono sur multaj kulturkampoj Esperanto reale ekzistas.

Okaze de la Zamenhof-festo en 2019 vizitis nin ĵurnalistino de „Deutsche Welle“ kaj aperigis poste retfilmon. Ankaŭ pri tio aperis poste artikolo en la regiona gazeto kun granda foto, kune kun la urbestro de la Esperanto-urbo Herzberg am Harz kaj denove la temo aperis inter la gravaj eventoj en la jarresuma „Chronik 2020“, kun granda grupfoto antaŭ la Zamenhof-monumento sur la Zamenhof-placo. Aperis ankaŭ diversaj intervjuoj, ekzemple kun la urbestro kaj partoprenantoj de la tiama GEA-klerigseminario.

## Raportado pri eventoj

Bonaj informmomentoj estis ne nur la diversaj internaciaj kongresoj en Herzberg aŭ kelkaj eŭropaj klerigprojektoj, sed ĉefe la decido de la urba konsilantaro en julio 2006 por la oficiala kromnomo „Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo“. Same estis elstaraj informeblecoj kiel la starigo de la Zamenhof-monumento (2009), la fondo de la Fondaĵo Esperanto-urbo Herzberg (2010), la inaŭguro de la Esperanto-placo antaŭ la stacidomo (2012), la inaŭguro de la Zamenhof-placo (aprilo 2017) kaj multaj Esperanto-rilataj ekspozicioj dum la lastaj pli ol dek jaroj en la kastela muzeo.

Rilate al Esperanto ne malofte aperis gazetartikoloj kun nia urbestro, vicurbestro, oficistoj de la Esperanto-urbo, plurfoje jare ankaŭ raportante pri la pola ĝemelurbo Góra, ja Esperanto estas en aktiva pontlingva funkcio por la oficialaj kontaktoj, junularaj kunvenoj, ktp. Pri tiu temo ni foje aparte informos.

## Foto-raportado

Pro la multaj aktivecoj, interalie pro la regulaj klerigofertoj de Germana Esperanto Asocio en Herzberg, ni kontaktis ankaŭ multajn gazetojn eĉ en grandurbaj regionoj kaj invitis ĵurnalistojn, raportistojn. Ofte ni mem preparis la manuskriptojn kaj aldonis proprajn taŭgajn fotojn. Tio estis bona varbado kaj por Esperanto kaj por la Esperanto-urbo. Dank' al tio ni povis varbi eĉ novajn kurspartoprenantojn kaj membrojn.

Estas ĝojige, ke plurfoje tutlande aperis gazetartikoloj (ofte kun fotoj de dulingvaj vojmontriloj) el la Esperanto-urbo Herzberg. Ĝis la komenco de 2020 ni sukcesis aperigi mezume preskaŭ ĉiusemajne gazetartikolon, plej ofte kun aktualaj fotoj.

Pluraj internaciaj fotoagentejoj, i.a. DPA, faris en Herzberg diversajn tipajn esperantrilatajn fotojn, kiuj volonte estas prenataj de la gazetaro eĉ el foraj regionoj. Kiel surprizetoj, eĉ en foraj landoj aperis fojfoje gazetartikoloj, eĉ en famaj gazetoj, magazinoj, ktp. Ekzemple tutpaĝa artikolo troveblis en „Gulf Times“ kaj en aŭtuno 2020 aperis bela granda foto kun la Zamenhof-monumento en Herzberg eĉ en New York Times.

Herzberg estas bona konkreta „vivanta“ reklamo por Esperanto. Tio estas utila varbado por GEA, UEA kaj por Herzberg kiel modela „Esperanto urbo“.

## Interreto kaj informbudoj

Ni provas regule informadi pri Esperanto-agadoj, novaĵoj ankaŭ per Facebook, per nia propra hejmpaĝo esperanto-urbo.de kaj per la urba hejmpaĝo http://herzberg.de. Tie oni trovas konstantajn informtekstojn pri Esperanto kaj ankaŭ novaĵojn. Ni sendas la tekstojn de gazetartikoloj pri Esperanto en la regiono por aperigo sur la urba hejmpaĝo, kie ili aperas sub la kategorio Esperanto-urbo. Kompreneble multajn Esperanto-rilatajn artikolojn oni povas trovi sur la hejmpaĝo de Harzkurier http://harzkurier.de per la serĉvorto ‚esperanto'.






Aliaj informagadoj okazas ekzemple per flugfolioj, starigo de informbudoj en Herzberg kaj aliaj urbetoj, kaj ĉe la somera Interkultura Festo en Göttingen. Tio praktike helpas por la disvastigado de Esperanto. La konstantaj ekspozicioj en la muzeo de la Welf-kastelo, longa Esperanto-muro kun preskaŭ trimil libroj en la urba biblioteko kaj granda publika Esperanto-informvitrino antaŭ la urbodomo ĉe la centra bazara placo estas pluaj konstantaj praktikaj inform- kaj disvastigeblecoj.

## Kolektado, arkivado, disponigo

Ni kolektas, skanas kaj arkivadas ĉiujn akireblajn gazetartikolojn pri Esperanto kaj la Esperanto-urbo. Kelkfoje esperantistoj kaj konatuloj el aliaj regionoj sendas al ni kopiojn, ĉar ili trovis ie gazetartikolojn kun la mencio de la unika „Esperanto-urbo“.

La artikolojn de *Harzkurier* ni kolektas aparte kaj prezentas ilin publike ankaŭ per la hejmpaĝo *http://esperanto-urbo.de* (menupunkto ICH/gazetaro, listo de gazetartikoloj kaj bildprezentado ekde 2006).

Eble tiuj ekzemploj povas servi kiel modeloj, reprodukteblaj instigoj por aliaj informantoj pri Esperanto. Bonvenon al bona kuna informlaborado!

# ICH Herzberg am Harz … – la Esperanto-urbo

# Programo

**Ĉiam marde 19 h Esperanto-Klubo (LEB) rete per Zoom / UEA (eventaservo.org): Buntaj vesperoj, diversaj temoj, interparoladoj, informoj, gastoj, kantoj, ktp: ICH Herzberg**

# Alvoko por konstruado de "Internacia "Esperanto-monumento" en la Esperanto-urbo

**Post la proklamo "Herzberg – la Esperanto-urbo" en julio 2006 multaj homoj, asocioj, ktp. ege ĝojis, gratulis, dankis, ekz. al la urbodomo kaj al nia siatempa urbestro Gerhard Walter.**

Ekzemple samideano Michel Basso el Colmar en Francio eĉ ofertis konstruadon de la unika kaj granda "Esperanto-monumento" por la nova "Esperanto-urbo". Li proponis, ke la Esperanto-Centro kolektu ekzemple specialajn memorindajn ŝtonojn el la tuta mondo, kiujn oni povus iel enkonstrui en la monumenton kaj per tio esprimi unikan Esperanto-solidarecon. Nia Esperanto-Centro alvokis por donacoj de ŝtonoj rilate al famaj lokoj. Eĉ okazis riĉa "ŝtonrikolto". Michel Basso eĉ vizitis la urbodomon kaj interparolis kun nia siatempa urbestro s-ro Gerhard Walter.

Eniris multe pli ol cent aparte memorindaj ŝtonoj, ktp. el Esperanto-rilataj kaj famaj lokoj el la tuta mondo. Ofte la donacintoj verkis dankvortojn kaj informis pri la specialaj trovlokoj.

Danke al al tiu riĉa internaciskala materialkolektaĵo ni povis organizi antaŭ ĉirkaŭ dek jaroj specialan ekspozicion sur la Esperanto-platformo en la muzeo de la Welf-kastelo. Tiu ekspozicio kun multaj vidindaj objektoj kaj klarigoj estis aparte laŭdata. Miloj da muzeovizitantoj vizitis la vere internacian Esperanto-ekspozicion. Evidente oni povis percepti unikan tutgloban solidarecon. Pro la ekonomiaj krizoj samideano Michel Basso ne povis mem realigi la konstruadon de la granda Esperanto-monumento.

Intertempe preterpasis ĉ. dekkvin jaroj. Samideano Michel Basso nun donacas por tiu nobla celo "Internacia Esperanto-monumento" respektindan monsumon por la Esperanto-Centro kune kun la espero, ke dum la venontaj jaroj oni povos komune konstrui unikan artobjekton en la Esperanto-urbo. Aparte taŭgaj momentoj por la finkonstruado, inaŭguro, ktp. povos ekzemple esti la someraj feriosemajnoj kun gelernantoj el Herzberg kune kun gelernantoj el nia pola ĝemelurbo Góra. Same ia kelklanda t.n. "Eŭropa projekto" aŭ simile povos esti taŭga "publika okazaĵo" por konstrui Internacian Esperanto-Monumenton. Tamen estos ankoraŭ sufiĉe longa preparvojo.

**Unue:** Ni dankas al samideano Michel Basso kaj stokos la monsumon sur apartan subkonton (Rückstellung) de la bankkonto de la Esperanto-Centro (Esperanto-Gesellschaft Südharz) en 37412 Herzberg am Harz. La Esperanto-Centro aldonos kroman monsumon por atingi entute 2.000,00 € (tiucelan komenckapitalon).

**Due:** Ni alvokos kaj estos dankemaj, se vi helpos rilate al plua monkolektado por tiu bona celo.

**Trie:** Ni fondos laborteamon "Internacia Esperanto-Monumento" en Herzberg (sub gvido de la Esperanto-Centro), ĉar estos multaj praktikaj preparloboradoj.

Kiu ŝatas iom kunkonstruadi ĉi-cele?

Se vi havas pluajn ideojn, vi povos skribi al ni.
Anticipe ni kore dankas pro via solidareco.

---

**Ab 15.06. 16:45 h** Endlich wieder dienstags unser „Esperanto-Klub“ im Esperanto-Garten !

**Ab ca. Ende Juni:** Neue Sonderausstellung „Firmen- & Produktnamen in Esperanto“,

Esperanto-Plattform, Museum im Welfenschloss

**11.07.21** Esperanto-Gartenfest ab 11 Uhr (15 Jahre Herzberg am Harz – die Esperanto-Stadt)

**+ 15 Uhr** EGS-Mitgliederversammlung, Esperanto-Centro / ICH (Esperanto-Ĝardeno)

**17.07.21 – 24.07.21** Universala Esperanto-Kongreso en Belfasto (Nord-Irlando), virtuale

**17.07. 21 – 25.07.21** Wir kreieren gemeinsam, Seminar im Esperanto-Centro Herzberg

Teilzeitige Teilnahme möglich. Ankaŭ kunvenoj laŭ interkonsento eblos! Komune ni konstruu!

**06.08.21 – 22.08.21** 100 Stunden Esperanto-Sommersprachkurse im ICH in Herzberg kun inaŭguro de oficiala dulingva informtabulo sur monto „Gr. Knollen“ (Restoracio)

**10.08.21 10h** Beteiligung an der Ferienpassaktion der Stadt Herzberg

**Ende September:** Unsere Teilnahme an einem EU-Projekt in Italien

**01.10.– 03.10.21** TORPEDO, AGEI & GEA-Weiterbildungswochenende u.a. mit einer großen Besuchsdelegation aus Polen (EU-Projekt K1)

**30.10.21 14:30** JHV des Deutschen Esperanto-Bundes in Herzberg bzw. Osterode

**Ab Okt. 2021** Teilnahme an einem EU-Projekt „Erasmus+“, Leitung in Toulouse/Frankreich

**12.11. – 14.11.21** Esperanto-Wochenendkursus im Esperanto-Centro (ICH)

**10.12. – 12.12.21** DEB-Weiterbildungsseminar, Zamenhof- & Weihnachtsfeier am 11.12.21

Se estas demandoj, bv. kontakti nin!
Eta teamo konstante laboradas kaj kreas por Esperanto!

# Neue Webseiten des Österreichischen EsperantoVerbands

**Wie Sie vielleicht schon gemerkt haben, haben sich Aussehen und Inhalt der österreichischen Esperanto-Webseiten (www.esperanto.at) komplett geändert. Hier einige Informationen über die Motive für diese Neugestaltung und eine Einführung in die Ziele und Angebote der neuen Webseiten.**

## Motive

Während der letzten Jahre hat sich mehr und mehr gezeigt, dass eine ernsthafte Verbesserung der österreichischen Esperanto-Webseiten notwendig ist.

## Technische Probleme

Mit den alten Webseiten gab es einige technische Probleme, die uns dazu zwangen, Änderungen vorzunehmen:

- Die Webseiten basierten auf einer veralteten Version des Content-Management-Systems TYPO3. Schon aus Sicherheitsgründen war es notwendig, sie zu aktualisieren und den Inhalt der Seiten anzupassen.
- Die ursprünglichen Ersteller betreuten die Webseiten nicht mehr, wodurch wir uns nicht mehr gut darum kümmern und Änderungen vornehmen konnten.
- Das alte System schaute auch schon sehr unmodern aus und war nicht zum einfachen Lesen zum Beispiel auf modernen Mobiltelefonen geeignet.

## Inhaltliche Probleme

Aber auch der Inhalt passte nicht mehr zu den Anforderungen der Gegenwart:

- Die Webseiten enthielten viele statische Informationen, die zum Teil veraltet waren, zum Teil einfach nicht mehr benötigt wurden.
- Die verfügbaren Informationen zu Esperanto im Internet haben sich ja vervielfacht, sodass es einfach nicht mehr Sinn hatte, zu versuchen, einen Überblick über alle Informationen im Netz zu geben.
- Auch waren viele Informationen, die unsere Webseiten zur Verfügung stellten, jetzt einfacher und in guter Qualität und Aktualität auf anderen Webseiten zu finden – ob in der Esperanto-sprachigen Wikipedia, ob in spezifischen Webseiten wie lernu.net oder edukado.net
- Andererseits fehlten ja aktuelle Informationen über die Esperanto-Bewegung sowie Ereignisse und Veranstaltungen in Österreich.
- Die alten Webseiten boten den Lesern auch wenig Anreiz zum Dialog mit uns und zu eigenen Beiträgen.

## Das Projekt

Aus den erwähnten Gründen beschloss der Vorstand des Österreichischen Esperanto-Verbands (AEF), völlig neue Webseiten zu erstellen – technisch realisiert durch das erfahrene Team von E@I (Edukado@Interreto), das schon die aktuellen Webseiten des Italienischen Esperanto-Verbands erstellt hat, die unter www.esperanto.it zu finden sind.

## Ziele

Die Neuerstellung der Webseiten hatte mehrere Ziele, sowohl technische als auch inhaltliche:

- Die Webseiten sollten auf einem aktuellen Content-Management-System (Wordpress) basieren und regelmäßig von einem erfahrenen externen Team (E@I) technisch aktualisiert und unterstützt werden.
- Es sollte nicht mehr passieren, dass das System veraltet und keine Experten zur Betreuung und Aktualisierung verfügbar sind.
- Die Webseiten sollten sowohl auf konventionellen Rechner-Bildschirmen als auch auf aktuellen mobilen Geräten, wie zum Beispiel Tablett-PCs und Smartphones, gut ausschauen.
- Der Inhalt der Webseiten sollte sowohl für Menschen, die Esperanto noch nicht kennen oder sprechen, als auch für Menschen, die bereits unsere Sprache sprechen und sich für das Esperanto-Leben und die Esperanto-Bewegung in Österreich interessieren, geeignet sein. Deshalb sollte so viel wie möglich sowohl auf Deutsch als auch auf Esperanto lesbar sein.
- Wir wollten nicht mehr versuchen, allgemeine Informationen über Esperanto anzubieten, die man auch anderswo in besserer Qualität findet. Statt auf viele statische, rasch veraltende allgemeine Informationen sollten sich die Webseiten auf aktuelle Informationen über Esperanto in Österreich spezialisieren.
- Die Webseiten sollten den Lesern ermöglichen und sie dazu veranlassen, selbst zum Inhalt beizutragen und sich an Diskussionen zu beteiligen.

## Das Ergebnis

Hier ein Überblick über die Angebote der neuen Webseiten, mit denen wir versuchen, diese Ziele zu erreichen, und auf die man jetzt über die Internetadresse www.esperanto.at zugreifen kann.

- Die Startseite zeigt die aktuellsten Neuigkeiten zu Esperanto in Österreich. Zusätzlich informiert sie über die wichtigsten Esperanto-Organisationen und -Veranstaltungen in Österreich und bietet ein vorgelesenes Gedicht auf Esperanto an
- Über Menüs erreicht man einfach und schnell

Unterseiten mit mehr Neuigkeiten und mit Informationen zu Esperanto und dem Österreichischen Esperanto-Verband. Die Seiten passen sich automatisch an verschiedene Geräte und Bildschirmgrößen an.

- Auf allen Seiten kann man zwischen deutscher Sprache und Esperanto auswählen. Fast alle Informationen zu Esperanto und dem österreichischen Esperanto-Verband sind in beiden Sprachen verfügbar. Artikel und Kommentare sind normalerweise entweder auf Deutsch oder auf Esperanto verfügbar.

- Besucher der Webseiten können sowohl eigene Artikel beitragen, die sie an die EmailAdresse des Österreichischen Esperanto-Verbands (aef@esperanto.at) schicken, als auch Kommentare zu existierenden Artikeln über ein Web-Formular abgeben.

- Für Menschen, die Mitglied im Österreichischen Esperanto-Verband werden wollen, stellen die Webseiten ein Web-Anmeldeformular zur Verfügung, das automatisch den zu zahlenden Mitgliedsbeitrag berechnet und Informationen über die Zahlungsarten gibt.

- Für diejenigen, die Inhalte der alten Webseiten vermissen, gibt es ein Archiv, das über die Seite zur Geschichte von Esperanto in Österreich erreichbar ist.

Wir hoffen, dass Ihnen die neuen Webseiten gefallen, und laden Sie ein, diese regelmäßig zu besuchen, um die neuesten Informationen zu Esperanto in Österreich zu erfahren.

### Vikidatumoj (Wikidata)


Ni ĉiuj konas la Vikipedion (Wikipedia), la interretan enciklopedion. Ĝi estis fondita en la jaro 2001, do antaŭ 20 jaroj.

Bedaŭrinde la amaso da artikoloj nur malfacile estas aŭtomate traserĉebla. Ekzemple, se vi volas scii, kiom da Esperanto-monumentoj ekzistas en la mondo.

Por tio pli bone taŭgas Vikidatumoj (WikiData). Fondita en la jaro 2012, ĝi estas kolekto da objektoj, simile al Vikipediaj artikoloj. Ĉiu objekto havas nomon Q sekvita de nombro.

Ekzemple la Zamenhofa monumento, Vieno havas la nomon Q38007732 kaj estas trovebla ĉe https://www.wikidata.org/wiki/Q38007732.

Tie estas listigitaj diversaj "atributoj". Ekzemple la Zamenhof monumento "estas" (P31) "Zamenhof/Esperanto-objekto" (Q75762).




*bildo 1 Vikidatuma objekto*

Kiom da aliaj Zamenhof/Esperanto-objektoj estas troveblaj? Por traserĉi Vikidatumojn, sufiĉas, malfermi https://query.wikidata.org/ kaj entajpi kelkajn liniojn da teksto.

Dieses Portal ist wie eine

**glitzernde Kristallkugel**

Jede Seite bringt Überraschungen: Schönheiten der Sprache, der Musik, der Spiritualität.

Reiche Schätze

- hineinspüren - hineinhören - hineinschauen -

in jahrelanger Arbeit übersetzt

ins Esperanto


an einer Stelle.

Originale in Esperanto

Ökumene

www.fontoj.net

Mit Versionen in deutsch, englisch, französisch






# Kiel apogi nian lingvon kadre de Eŭropa Unio?

## 1 La civitana debato

Kiel elemento de la Konferenco pri la estonteco de Eŭropo la eŭropuniaj civitanoj estas invititaj proponi kaj diskuti ideojn, kiamaniere Eŭropa Unio (EU) evoluiĝu. Eŭropa Komisiono starigis platformon por tiu civitana debato: *https://futureu.europa.eu* (havebla en ĉiuj 24 oficialaj lingvoj de EU, elektu vian lingvon je aliro).

Kelkaj proponoj jam afiŝitaj rilatas al la lingva reĝimo de EU (komuna lingvo, lingva egalrajteco ktp.). Kelkaj el ili pledas por la uzo de Esperanto (vidu sube), aliaj proponas ekzemple la anglan aŭ alian etnolingvon aŭ la novlatinan kiel komunan lingvon de EU.

## 2 Teknikaj konsiloj

Eblas uzi la civitanan platformon je du manieroj:

▶ **sen** registriĝo: vi rajtas legi ĉion en la civitana platformo (proponojn, komentojn ktp.)

▶ **kun** registriĝo: **vi rajtas legi kaj aktive partopreni** = proponi proprajn ideojn, apogi proponojn jam afiŝitajn, komenti pri proponoj, respondi al komentoj de aliaj partoprenantoj.

### 2.1 Kiel registriĝi?


Se vi intencas apogi por-Esperantajn proponojn kadre de la civitana dialogo en la Konferenco, vi devas registriĝi.

Je via unua aliro al la retejo de la civitana platformo *https://futureu.europa.eu:*

▶ elektu vian lingvon el la 24 oficialaj lingvoj de EU

(ne, bedaŭrinde Esperanto ne jam estas inter ili)

▶permesu aŭ malpermesu al la platformo la uzon de kuketoj je via komputilo.







Ŝajnas, ke malpermeso ne kaŭzas teknikajn problemojn.

Alklaku la ligilon „Ensaluti“ dekstre de la eŭropunia flago.

Vi estas alidirektita al la paĝo de „EU Login“, la aŭtentikiga sistemo de EU por ĝiaj retejoj. Ne jam entajpu vian uzotan uzantnomon aŭ retpoŝtadreson en la kampon, sed nepre alklaku „Krei novan uzantkonton“ sub tiu kampo.

En la sekva ekrano vi devas plenigi ĉiujn kampojn: nomo, retpoŝtadreso, lingvo uzota por retejaj mesaĝoj sendataj al vi kaj „kodo“. Kiu kodo?

Por eviti, ke robotoj registriĝas, la sistemo uzas kaptilan bildon (angle „captcha“). Oni devas entajpi la signojn (literojn kaj ciferojn) afiŝitajn en tiu bildo. La kaptila bildo supozeble ne legeblas por komputiloj, sed foje ĝi estas kvazaŭ nelegebla ankaŭ por homo. Se vi havas problemojn klare ekkoni la afiŝitajn signojn, alklaku la trilateran sagon ▶ super la bildo (sub „entajpu la kodon“): sintetika voĉo laŭtlegas la afiŝitan kodon. Aŭ alklaku la duoblan, kurbitan sagon por afiŝi novan kaptilan bildon, espereble pli bone distingeblan. Foje pluraj provoj estas necesaj, ne malkuraĝiĝu! Atento: **uskleco gravas** je la kodo.

Ne forgesu alklaki la tutlastan kampon: via konfirmo, ke vi legis kaj komprenis la deklaron pri la protektado de viaj datumoj, estas legebla, alklakante la ligilon. Sen via konfirmo ne eblas progresi.

Laste, alklaku la plej malsupran kampon „Krei novan uzantkonton“.

Se viaj informoj estas formale en ordo, afiŝiĝas konfirma teksto kun danko pro via registriĝo. Tiu konfirmo enhavas la atentigon, ke vi ricevos mesaĝon al la retpoŝtadreso, kiun vi

ĵus registris. **Atendu tiun mesaĝon** (foje ĝi alvenas nur post kelkaj minutoj), kaj alklaku la ligilon en tiu mesaĝo.

Vi estos denove direktata al la aŭtentikiga sistemo „EU Login“, sed nun rekte al ekrano, kiu postulas, ke vi elektu vian pasvorton. La sistemo nur akceptas pasvorton kun longeco de almenaŭ 10 signoj (literoj kaj ciferoj), kiu ankaŭ plenumas almenaŭ tri el la sekvaj kvar kondiĉoj:

- ĝi enhavas almenaŭ unu majusklon, A...Z
- ĝi enhavas almenaŭ unu minusklon, a...z
- ĝi enhavas almenaŭ unu ciferon, 0...9
- ĝi enhavas almenaŭ unu specialan signon: !“#$%&'()*+,-./:;<=>?@[\]^_`{|}~

Se la entajpita pasvorto estas pli mallonga ol 10 signoj, aŭ ne plenumas tri el la kvar supraj kondiĉoj, la sistemo ne akceptas ĝin kaj postulas novan, taŭgan pasvorton. Entajpu la saman pasvorton en la du kampoj por konfirmo.

Se ĉio iris glate, la mesaĝo sur la ekrano konfirmas, ke via pasvorto nun validas. Gratulon!

Se vi alklakas „sekva paŝo“, vi estas pludirektata al la civitana platformo.

### 2.2 Je via unua eniro en la civitanan platformon

Je via unua eniro kiel registrita uzanto vi estas konfrontata al demandaro. Vi ne devas respondi la demandojn, simple alklaku, ke vi ne deziras respondi ilin. Aŭ respondu nur kelkajn, laŭ via deziro.

Finfine alklaku la kampon „Stori la datumojn“.

*Se vi spertas teknikan problemon, kiun superi vi ne sukcesas, mi klopodos helpi.*

*Skribu al mi (Klaus Leith): KDL@gmx.eu (esperantlingve aŭ etnolingve, laŭ via prefero, ni elturniĝos).*

## 3 Koncentriĝo de nia agado

Utilas pripensi, kiel plej efike agi kadre de la civitana debato. Ni koncentru niajn klopodojn:

- Enkonduko de tro da similaj proponoj riskas malvidebligi la esperantistan arbaron pro tromulto da arboj.
- Efikas la koncentriĝo je kelkaj proponoj, kiujn ni grandnombre apogas kaj favore komentas (vidu sube).
- Eblas malfavore komenti proponojn, kiuj kontraŭas nian starpunkton (ekz.: proponita enkonduko de la angla kiel komuna EU-lingvo). Eblas „ŝati“ aŭ „malŝati“ komentojn, afiŝitajn je iu propono. Oni kondutu ĉiam kun respekto por aliaj opinioj, sen nenecesa polemiko. Ju pli ĝentila kaj bonhumura estas la reago de esperantistoj, des pli efike ĝi impresas neesperantistojn (kaj tiujn ni celas, ne niajn jam konvinkitajn samideanojn).

## 4 Por-Esperantaj proponoj en la civitana debata platformo

Apogu ĉi tiujn proponojn:

- **Esperanto, a common and neutral language, designed to be easy to learn. A new tool for a more united European Union.**


*(Esperanto, komuna kaj neŭtrala lingvo, facile lernebla = nova ilo por pli unuiĝinta EU)*

*https://futureu.europa.eu/processes/OtherIdeas/f/8/proposals/5399*

- **Taalonderwijs in Europa**

*(Enkonduko de Esperanto en la lernejojn)*

*https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/260*






**„Es war alles andere denn Esperanto."**

# Esperanto im Gebrauch der Nazipropaganda im Kriegsjahr 1942

**Die Nationalsozialisten, deren Herrschaftszeit zwischen 1933 und 1945 von Gewalt, Verfolgung und Krieg geprägt war, waren bekanntermaßen keine Freunde des Esperanto.**

Bereits in den 1920er Jahren wandten sie sich aktiv gegen die „lingvo internacia", und Adolf Hitler bewertete Esperanto in seinem 1925 erschienenen Machwerk „Mein Kampf" als Bedrohung – als Sprache, die dereinst zur Universalsprache aufsteigen werde, wenn die Juden die Weltherrschaft an sich gebracht hätten. Durch die lesenswerte Darstellung von Ulrich Lins sind wir umfangreich darüber informiert, wie die Nazis die aus ihrer Sicht „gefährliche Sprache" seinerzeit in Deutschland bekämpften und wie es zur Auflösung der Arbeiter-Esperanto-Bewegung (1933) bzw. zu Gleichschaltung (1933) und Auflösung des Deutschen Esperanto-Bundes (1936) kam.

Umso bemerkenswerter ist es, wenn sich die offizielle Propaganda des Nazistaates doch einmal des Esperanto bediente. Ich beziehe mich auf einen Fund in der Kösliner Zeitung, im Untertitel als „Nachrichtenblatt der Landesbauernschaft, Deutschen Arbeitsfront und der Staatlichen und Städtischen Behörden" betitelt, zugleich fungierend als „Parteiamtliche Zeitung der NSDAP., Gau Pommern", Ausgabe Nr. 229 vom Donnerstag, 20. August 1942. Der Artikel ist – ohne Nennung eines Autors – mit „Aus dem Führerhauptquartier" überschrieben und seinerseits Teil einer ausführlichen Berichterstattung unter dem Titel „Invasions-Versuch kläglich gescheitert". Die Überschrift lässt vermuten, dass ähnliche Ausführungen auch in weiteren deutschsprachigen Organen zu lesen waren. Der besagte Artikel umfasst die gesamte erste Seite plus etwa ein Drittel der beiden ersten (von vier) Spalten auf der Folgeseite; er wird ergänzt durch einen zusammenfassenden PK-Bericht von „Kriegsberichter Robert Baer" sowie einen Kommentar „Darauf hatten wir gewartet!" von Buschmann. – Die Esperanto betreffende Passage lautet wie folgt (Hervorhebungen in Sperr- und Fettdruck wie im Original):

> „Der amerikanische General Clark wandte sich am Dienstag ebenfalls an die Presse und teilte vielsagend mit: ‚Wir bereiten Tausende von amerikanischen Soldaten für die Landung auf dem Kontinent vor […]. Ich kann Ihnen nicht mitteilen, was Churchill und Stalin im einzelnen besprochen haben, a b e r d i e u n a u s g e s p r o c h e n e n W o r t e w e r d e n d i e s b a l d e n t h ü l l e n, u n d d i e s e W o r t e w e r d e n n i c h t i n E s p e r a n t o a u s g e d r ü c k t w e r d e n.'
>
> **Das hat die deutsche Abwehr bewiesen: es war alles andere denn Esperanto, was die Landetruppen erwartete!"**




Bereits auf den ersten Blick wird deutlich, dass nicht die Sprache Esperanto selbst thematisiert wird, sondern nur ihre Eigenbezeichnung. Diese wiederum wird als Symbol verwendet, und zwar in der Bedeutung „friedliche Kommunikation", was auf metaphorischer Ebene als „gewaltloser Widerstand" zu deuten ist. Im Kontext betrachtet geht es hier letztlich um die „Sprache des Krieges", die mit der neutralen, der Völkerverständigung dienenden Plansprache Esperanto rein gar nichts zu tun hat. Ebenfalls deutlich wird, dass Esperanto nicht etwa von deutscher Seite aus ins Spiel gebracht wird, sondern von alliierter. Die Nazi-Propaganda greift das Stichwort auf, reagiert aber letztlich nur – so jedenfalls stellt sich die Situation dar, wenn man davon ausgeht, dass die Aussage des US-Generals Clark korrekt wiedergegeben ist. Bemerkenswert ist, dass von der angeblichen Gefahr, die die Nazis vom Esperanto ausgehen sahen, hier nicht einmal ansatzweise die Rede ist, dass Esperanto im Gegenteil – unbeabsichtigt – als positiv, nämlich als Zeichen der Gewaltlosigkeit bewertet wird.

En la soraba mitologio serpentoj estas bonaj, bonkoraj kaj feliĉigaj bestoj. Iam oni eĉ kredis, ke se en iu domo – ĉu subtegmente aŭ en ties kelo – vivis unu paro da serpentoj, tiu domo estis bonstata, feliĉa kaj benata de Dio. El tiu estimo por serpentoj radikas la legendo, laŭ kiu tiuj bestoj ankaŭ havas sian propran reĝon – do la serpentan reĝon. La serpenta reĝo estas rekonebla je blanka, brilanta strio sur sia dorso. Li kutimas renkontiĝi kun aliaj serpentoj de la Spree-arbaro por komuna ludado en iu senarbejo meze de la arbaro. Iam li ankaŭ havis kronon sur sia kapo, kaj por povi ludi, la serpenta reĝo desurkapigis sian kronon kaj metis ĝin sur blankan tukon, kuŝantan en la brilanta suno, por ke li ĉiam povu bone vidi ĝin. Se iu volis ŝteli la kronon de la serpenta reĝo, tiam li aŭ ŝi devis nepre ekscii, kie la serpenta reĝo ĝuste ludas kun siaj regatoj. Laŭ la legendo tio sukcesis nur unu fojon al iu sudlanda grafo, kiu restadis en la Spree-arbaro kaj eksciis pri la serpenta reĝo. Li serĉis lin, fine trovis – kaj sukcese forŝtelis lian kronon! Ĉiuj serpentoj sekvis la grafon, dum li kvazaŭ frenezulo forrajdis per sia ĉevalo. Fine la grafo kun sia ĉevalo saltis trans foson kaj super altan muron – kaj tio estis tro por la serpentoj. La ŝtelita krono riĉigis la grafon: danke al ĝi li povis eĉ konstrui novan, grandan palacon. Sed li tamen ne forgesis la serpentan reĝon, kies krono ja ebligis tion al li: en la nova emblemo de la grafo ekde tiam aperis ĉiam serpento. Kaj la serpenta reĝo? Nu, li lernis el sia eraro kaj ekde tiam ne plu surmetas kronon sur sian kapon. Oni ja bonege rekonas lin ankaŭ je la blanka, brilanta strio sur sia dorso. Kaj li ankoraŭ aktivas en la Spree-arbaro, inter la arboj, senarbejoj kaj kanaloj de Spree-rivero: foje oni povas vidi lin, sunbanante kaj ĝuante la varmecon de la suno, kun sia blanka, brilanta, tuj rekonebla strio sur la dorso.



**Sur la bildo: emblemo de la Spreearbara „ĉefurbo“ Bórkowy kun la serpenta reĝo**.

# *Lutki:* fabelaj hometoj el la Spree-arbaro

**Mi prezentis al vi la legendon pri la serpenta reĝo, kiu en la soraba mitologio ludas gravan rolon. Nun vi konatiĝos kun la hometoj, sorabe *Lutki*: aliaj fabelaj estaĵoj, kiuj en la soraba fabelmondo estas same gravaj.**

Ili estis malgrandaj, ĉiam malsataj, prunteprenis ilojn de la homoj, kaj havis tre strangan parolmanieron: jen la ĉefaj trajtoj de tiu stranga popolo de etaj homoj, kiu vivis en la Spree-arbaro kaj malsupra Luzacio antaŭ la alveno de la kristanismo en tiun mitoplenan regionon.

Por la "normalaj" homoj Lutki (hometoj) estis ĉiutagaj akompanantoj, kvankam ankaŭ iomete streĉigaj. Fojfoje ekzemple ili "prunteprenadis" ilojn kaj aparatojn el kamparana posedaĵo, kaj ili estis ankaŭ iomete (tro) manĝegemaj. Nur kuminon ili ne ŝatis. Pro tio la homoj bakis siajn panojn ĉiam kun iomete da kumino, ĉar tiel la Lutki ne formanĝis ĝin. Sed ĝenerale Lutki estis bonnaturaj kaj ne damaĝis la homojn. Ilia parolmaniero estis stranga: ili ĉiam neis ĉion, do ekzemple ili diris: "mi ne volas ne manĝi panon"



por esprimi, ke ili ja volas manĝi panon. Foje tiu komplika esprimmaniero vere malfaciligis la interkompreniĝon kun homoj, sed la kunvivado de homoj kaj la Lutki estis tamen tre paca. Iliaj loĝlokoj troviĝis sub la tero, kaj ili ĉiam venis surfacen, kiam la kamparanoj plugis la kampojn tro profunde.

Laŭdire ili forlasis Luzacion kaj la Spree-arbaron post alveno de kristanismo en tiun regionon. La kialo estis tre simpla: ili ne povis elteni la laŭtan sonoriladon de la novaj preĝejoj. Komence ili planis detrui la sonorilojn, sed la iloj por detrui ilin estis aŭ tro pezaj por la hometoj, aŭ la preĝejturoj estis tro altaj por ili. Ili ne vidis alian solvon ol forlasi Luzacion kaj la Spree-arbaron. La legendo diras, ke ili migris suden, al Bohemio. Kaj tie, en Bohemio, manĝaĵoj kun kumino ĝis hodiaŭ estas tre popularaj...

Laŭdire malmultaj tamen restis en la Spree-arbaro: kelkaj homoj asertas, ke ili daŭre vivas ie ĉirkaŭ la antikva fortikaĵo de la Spree-arbara "ĉefurbo" Bórkowy. Kiam arkeologoj ekzemple komencis fosi ie en Luzacio, la soraboj neniel volis subteni tiun agadon, ĉar ili ne volis ĝeni la tie restintajn Lutki-ojn. Kaj kiam la sciencistoj trovis antikvajn potojn kaj similajn objektojn sub la luzacia tero, la soraboj tion tuj akceptis kiel pruvon, ke Lutki-oj ekzistis kaj daŭre ekzistas en Luzacio. En la soraba konscienco almenaŭ ili daŭre estas absolute prezentaj!



# La soraba akvoviro

**Inter la multaj legendoj kaj mitoj de la soraba popolo en Luzacio (sudorienta Germanio) gravas ankaŭ la legendo pri la akvoviro.**

Ne mirigas, ke mita figuro, ligita kun akvo, ludas gravan rolon en Luzacio – en la soraba (kiu estas slava lingvo) tiu regiono nomiĝas Łužica aŭ Łužyca, kio en la praslava signifas "marĉolando": la nordan parton de Luzacio kovras la vasta Spree-arbaro – praarbaro, kiun trafluas multegaj apudaj riveretoj kaj kanaloj de la rivero Spree. La suda, pli montareta parto de Luzacio, enhavas amason da pitoreskaj lagetoj. Luzacio do ofertas multajn tre konvenajn loĝeblecojn por iu, kies natura ĉirkaŭaĵo konsistas el akvo.

Kompreneble ĉiuj magiaj povoj de la akvoviro koncentriĝas ĉirkaŭ la akvo: se super iu lago fulmotondras, aŭ la akvo maltrankvilas, tiam kompreneble la akvoviro kulpas. Se en printempo la akvo de riveroj altiĝas, ĝi signifas, ke la akvoviro finis sian dumvintran dormon kaj nun, tute malsata, denove aktivas. Kaj tiam estas precipe danĝere por infanoj: se la akvoviro malsatas, oni ne tro proksime iru al akvobordo! Ofte li fortimigas la infanojn, por ke ili ne tro proksimiĝu al sia reĝejo. Sed se la infanoj tamen kuraĝas, li tiros ilin al grundo de la akvaĵo. Oni ankaŭ ne tuŝu la belajn aktiniojn, ĉar la akvoviro malŝategas kaj eluzas la homan scivolemon. Foje la akvoviro sidas ankaŭ ĉe la bordo de lagoj aŭ riveroj kaj fumante pipon trinkas vinon. Li ne ĝenerale estas malbona estaĵo; li nur ne ŝatas scivolemon kaj malatentemon. Kun la vilaĝanoj, kiuj respektas liajn makulojn, li havas bonan interrilaton. Li foje eĉ helpas la malriĉulojn kaj ege ŝatas muzikon kaj kartludojn kun ebriaj vilaĝanoj. Li tamen ne tro bele aspektas: li estas dikega, ofte tute senvesta, kaj pro sia vivado en la akvo kompreneble havas tre multajn surhaŭtajn faltojn. Malgraŭ sia aspekto la akvoviro tamen ne estas fraŭlo: laŭ la legendo li havas belan edzinon kaj eĉ pli belajn filinojn, kiuj ofte aperas dum vilaĝfestoj. Kiam la knaboj estas trinkintaj la unuan bieron aŭ vinon, la filinoj de la akvoviro ekdancas kun ili...

**Martin Ptasinski**



# Legendoj el Bavario

**Profesoro Renardo Fössmeier proponas regionajn legendojn el Bavario. Vi ekscios, ke ĉiam valoras esti bonaj por aliuloj, alie vi povas esti transformitaj al monto, ŝtono, roko aŭ fantomo.**

## La kruela reĝo Watzmann

En la regiono de la urbo Berchtesgaden, en la plej sud-orienta angulo de Bavario, laŭdire iam regis reĝo, kiu nomiĝis Waze, Wazeman aŭ Watzmann [*vacman*]. Li estis kruela kaj amis nur sian familion, nome edzinon kaj sep gefilojn, kaj la ĉasadon de sovaĝaj bestoj; tiujn li pelis ĉevalrajde kaj fine igis siajn hundojn disŝiri la ankoraŭ vivantan predon. Li ĉasis ne pro la viando, sed nur pro la plezuro vidi la doloron de la turmentataj ĉasbestoj.

Iun tagon la ĉastrupo de la reĝa familio rajde preterpasis bieneton, antaŭ kiu sidis maljunulino, lulanta nepeton. Kiam la reĝo vidis ilin, li direktis sian ĉevalon flanken kaj igis ĝin hufpremi la kompatindulojn. Pro iliaj krioj la bienulo kaj lia edzino alkuris el la domo; ilin trafis la sama sorto, je la amuzo kaj rido de la reĝo kaj lia familio.

Dum siaj lastaj sekundoj la bienistino levis sian manon kaj flustris: "Dio punos, kion vi faris; li vin transformos en rokojn." Kaj tuj la grundo ektremis, la krueluloj falis de siaj ĉevaloj, kaj kiam ili tuŝis la grundon, ili iĝis rokoj, grandaj kiel montoj.

De tiam sude de Berchtesgaden staras la Watzmann-montoĉeno, kiu konsistas el du preskaŭ same altaj pintoj (2713 metroj kaj 2712 metroj) por la gereĝoj kaj malpli altaj pintoj, kiuj simbolas la gefilojn.

## Gundulino de la Fojna Monto

Kie la baseno de Rosenheim limas al la nordaj Alpoj, proksime de la vilaĝo Nussdorf, situas la monto Heuberg (Fojna Monto). Ĝi altas iom malpli ol 1400 metrojn, do povas porti fekundajn herbejojn. Kaj ĝian sud-okcidentan flankon somere favoras la suna lumo, tiel ke kamparanoj tie paŝtas siajn bovojn, kiuj tamen vintre devas reveni al la valo. Tion oni nomas alpeja mastrumado. La nomo Fojna Monto montras, ke la alpaj herbejoj tie ne nur somere nutris bovojn, sed eĉ provizis fojnon, uzeblan kiel provizaĵo por la vintro. Iam la plej fekundan alpon de Fojna Monto zorgis alpistino, kiu nomiĝis Gundulino. Ŝi estis diligenta, sed malafabla. Ŝi ŝatis neniun kaj estis kontenta somere vivi sur la soleca alpejo, kie malofte preterpasis aliaj homoj. Iun tagon ŝi bakis panon en sia forno, kiam alproksimiĝis maljunulo, aspektanta malriĉe. Flarante la odoron de la freŝa pano, li petis pri peceto, sed la malafabla Gundulino insistis, ke ŝi ne havas panon, kaj ke ŝia bakforno estas malplena. Levante ŝtonon ŝi diris: "Jen mia tuta provizo. Se tio ne veras, mi estu transformita en tian ŝtonon!"

En tiu momento nigraj nuboj leviĝis okcidente ĉe la monto Wendelstein, kaj terura fulmotondro formiĝis, kiu frapis la tutan alpejon per fulmoj. Kiam leviĝis la nuboj, la fekunda herbejo estis for, ne kreskis eĉ unu tigo. Restis nur la senkompata alpistino kaj ŝia bakforno – sed transformitaj al rokoj. Du montopintoj okcidente de Heuberg nun portas la nomojn *Kundl* (= Gundulino; 1115 metroj) kaj *Backofen* (= bakforno; 1136 metroj), kiel avertiloj al homoj, kiuj ne kompatas siajn proksimulojn.

## La diablo kaj la vento de Erl

En la valo de la rivero Inn, kiu el la tirolaj Alpoj fluas al Bavario, situas la vilaĝo Kirnstein. Aliflanke, sur la tirola (aŭstria) bordo, situas la vilaĝo Erl; ĝi nun estas konata pro siaj pasionaj prezentaĵoj. La loĝantoj ambaŭflankaj estas de bajuvara deveno kaj havas komunan tradicion. La vento, kiu blovas laŭlonge de la valo, kutime matene venas de sudo kaj ofte portas varmon, kiun ĝi kolektis malsuprenirante de la montoj. Tagmeze ĝi ofte ŝanĝas sian direkton kaj reiras suden. Tio plej rimarkeblas ĉe la elirejo de la valo ĉe Erl, tial oni nomas la venton "Erler Wind" (= vento de Erl). Nokte la ventodirekto kutime reŝanĝiĝas. Laŭ legendo iam tiu vento iris nur unudirekte. La diablo, admiranta la rapidecon de la vento, aliĝis al ĝi, kaj dum iom da tempo ili kune laŭkuris la riveran valon. Sed alvenante proksime de Kirnstein, la diablo diris al la vento: "Bonvolu atendi momenton, mi devas iri aliborden, al Erl, sed tuj revenos." Tamen la diablo neniam revenis, kaj nun la vento ĉiutage iras norden-suden laŭ la valo, serĉante la diablon, kiu tamen jam delonge iris aliloken.

## Sovaĝaj ŝipistoj sur la rivero Inn

Iam la rivero Inn estis uzata por ŝipa vartransporto. Pro la varia profundeco de la akvo, kun danĝeraj rokoj, la ŝipoj havis platajn fundojn kaj nomiĝis plat-ŝipoj (*Plätten*). Irante al la valo ili povis drivi kun la fluo de la rivero, sed por la alia direkto necesis ĉevaloj, kiuj tiris la ŝipojn, trotante sur la rivera bordo.

La ŝipanaro de tia platŝipo, aparte granda, estis krudula grupo; ili ne atentis aliajn ŝipojn aŭ homojn, piedirantajn sur la riverbordo. Kiu renkontis ilin, devis fuĝi, por ne kolizii kun ilia ŝipo, aŭ trafi sub la hufojn de iliaj ĉevaloj. Sed iun tagon la ŝipo maltrafis la – ofte ŝanĝiĝantan – ĉefan fluejon de la rivero kaj estis blokita de sabla bariero.

La ŝipistoj uzis sian tutan forton kaj fine sukcesis per siaj stangoj depuŝi la ŝipon de la bariero. Sed la rivera fluo turnis la ŝipon transversen, la larĝo de la fluejo ne sufiĉis, kaj granda roko frakasis la flankon de la ŝipo. Eĉ ne unu ŝipano sukcesis savi sin. Multaj homoj konsideris la akcidenton dia puno por ilia kruela konduto. Oni diras, ke la animoj de la kruelaj ŝipistoj ne povis eniri en la kristanan ĉielon, sed devas nun fantomi surtere. Kiam vespera vento trablovas sub la ponto de Nussdorf, oni diras, ke la aŭdeblaj sonoj estas la kriado kaj blasfemado de tiuj ŝipistoj, kaj la muĝado de la akvo sub la korpo de platŝipo. Oni rekomendas, ke, aŭdante tion, oni ekkuŝu surgrunde kun la brakoj krucitaj sur la brusto. Alie la kruelaj ŝipistoj povus onin devigi akompani ilin kaj fantomi kun ili.

(El *Juna Amiko*)



# Raportetoj de KEKSOanoj



# Malnovaĵoj de GEJ… – kaj aliĝu al JES!

**Wir präsentieren euch den zweiten Teil unserer Serie „Malnovaĵoj de GEJ". Dafür hat Michael neulich im DEB-Büro in Berlin vorbeigeschaut und sich von der freundlichen Mitarbeiterin Sibylle Bauer (liebe Grüße!) ein paar Kekse und zwei verstaubte und fast vergessene Aktenordner aushändigen lassen. Die beiden Aktenordner enthalten nicht weniger als das gesamte Archiv aller Ausgaben der *kune* bzw. *GEJ-gazeto* von 1990 bis 2009!**

Also steigt in den DeLorean, schnallt euch an, und ab geht die Fahrt ins Jahr 2001. Es ist Mai, die Sonne scheint friedlich über dem World Trade Center in New York, während die Deutsche Esperanto-Jugend auf der anderen Seite des Atlantiks, vom unaufhaltsamen technologischen Fortschritt berauscht, stolz verkündet (*kune* 3/2001):

### *Neuer Service für DEJ-Mitglieder: esperanto.de - email-Adressen*

*Ihr kennt die esperanto.de-Adressen schon, denn Vorstandsmitglieder, /·kune·/ redaktion und Mitgliederverwaltung haben bereits solche.*

*Jetzt wollen wir diesen Service auch unseren Mitglieder* (sic!) *anbieten. Für 5 DM pro Jahr erhaltet Ihr Eure persönliche esperanto.de-email-Adresse, z.B. Klara.Korn@esperanto.de. Diese Adresse ist eine „alias"-Adresse, d.h. die gesamte e-Post, die an die Esperanto.de-Adresse geschickt wird, wird automatisch an eure normale e-Postadresse weitergeleitet. Der Vorteile* (sic!) *sind eine leicht zu merkende Adresse und ihr könnt,* (sic!) *damit gleich ein bisschen Werbung für Esperanto machen.*

*Um so eine Adresse zu erhalten, müsst ihr 5 DM auf das Konto der DEJ überweisen (Ktr 8424900 BLZ 25120510) und eine Nahricht* (sic!) *an Steffen Pietsch schicken (Steffen.Pietsch@esperanto.de) und ihm darin mitteilen, wie Eure neue e-Postadresse lauten soll und an welche Adresse eure e-Post weitergeleitet werden soll. Bei Fragen könnt ihr Euch natürlich auch an ihn wenden.*




Mann, Mann, Mann, das ist ja eine tolle Technik, diese e-Post. Aber uff, dass die Jugend von damals so hart mit Rechtschreibung und Grammatik am strugglen war! Das liegt bestimmt an diesem Internet. À propos Internet:

### *Mehr als 200 Esperanto-Listen im Internet*

*Wer im Internet Nachrichten-, Diskussions- oder Verteilerlisten über Esperanto sucht, der findet unter www.eventoj.hu bereits mehr als 200 Stück, eingeteilt in verschiedene Gruppen. Neben Name, Adresse und Thema erhält der Benutzer auch technische Informationen über die Art der Anmeldung bei den jeweiligen Listen.*

Ihr reaktionärer Sexist:innen-Haufen, das heißt doch „Benutzer:in"! Damals hatte die DEJ nicht mal die Basics drauf. Wobei, so ganz stimmt das nicht: Aus der kune 3/2001 kann man nämlich auch erfahren, dass damals eine gängige (und, I guess, geschlechtsneutrale) Abkürzung für Esperantist:innen … „Espis" war. Da war die DEJ-Avantgarde aus dem Jahr 2001 uns heute doch schon etwas voraus, denn wirklich niemand benutzt dieses Wort heute noch – eine fatale Regression. (Naja, es klingt allerdings auch ein bisschen … knorke, haha.)

### *Espi bei „Wer wird Millionär?"*

*Am 12. und 14. Mai war bei „Wer wird Millionär?" Michael Zeilinger aus Fürth auf dem Stuhl der monetären Möglichkeiten. Trotz Lücken bei Dingen, die man „normalerweise" weiß, kam er bis zur 500.000-Markfrage: „In welchem Land lebt der dienstälteste Diktator Afrikas?" Er wählte Libyen und nicht Togo, was sich als falsch herausstellte – er gewann so „nur" 32.000,–. Allerdings ist nach Quellen, die der /·kune·/-Redaktion vorliegen zu bezweifeln, ob Togos Staatschef Eyadéma wirklich die richtige Lösung ist, wurde er doch im Rahmen der gesamtafrikanischen Demokratiebewegung in seiner Macht eingeschränkt und hat Jahre gebraucht, um sie wiederzugewinnen, was ihm nie wieder im ursprünglichen – diktatorischen – Umfang gelungen ist. Gaddafi ist hingegen immer noch Diktator, ein Inhaber unbeschränkter Macht.*

*Die /·kune·/ hält euch natürlich über alle kommenden Entwicklungen auf dem laufenden.*

Oh Mensch, das ist ja richtig bitter von 500.000 DM auf 32.000 DM abzurutschen wegen einer falschen Antwort, die vielleicht doch richtig war. Aber gut, was will man machen. Hauptsache ein Espi konnte bei Günther Jauch ein bisschen Espujo repräsentieren. Und immerhin bekam man damals seinen Gewinn in dEuTsChEr MaRk ausgezahlt, die war ja dAmAlS aUcH nOcH wAs WeRt.

Liebe Grüße auf jeden Fall auch an Michael Zeilinger. Schließlich gibt es in der damaligen Ausgabe (neben vielen anderen, teilweise sehr unterhaltsamen Beiträgen!) noch einen Reisebericht vom REVEL(ID)O, dem damals größten



**REVELO-tago en la jaro 2014 en Bielefeld.**

regelmäßigen Esperanto-Treffen in Nordrhein-Westfalen. Der ist auf Esperanto geschrieben und macht auch ganz gut was her als Einblick in die Etoso von vor 20 Jahren:

## *Ĝis revido, REVELIDO!*

*de Cornelia Rau, Freiberg*

*REVELIDO estas la porjunulara programo en la kadro de REVELO, la plej granda renkontiĝo de la esperantistaro en Nordrejn-Vestfalio. Lastfoje ĝi okazis la 5-an de majo en la fama bierurbo Warstein.*

*Mi tiom bone planis mian vojaĝon tra Nordrejn-Vestfalio: Vendrede mi alvenis al mia fratino en Dortmund; sabate mi volis viziti la REVELO-renkontiĝon, sed ne tuttempe, ĉar vespere mi jam intencis reesti en Dortmund por festi kun miaj familianoj kaj kelkaj geamikoj. Fin ne tamen ĉio ŝanĝiĝis.*

*Post unu horo en REVELO, meze dum prelegprogramo pri "la aktivecoj de diversaj lokaj grupoj", iu junulo subite tuŝetis mian ŝultron,  ustrante al mi: "Kelkaj el ni volas iri al turka restoracio, ĉu vi aliĝas?" Mi ne pripensis longe, prenis mian jakon kaj tuj retrovis min inter aro da junaj (kaj junecaj) etosemuloj. Survoje al la manĝejo mi eksciis, ke tiu ĉi ago ne estis spontanea fuĝo el iom teda programaro. La tuto nomiĝis REVELIDO kaj estis la tradicia porjunulara IDO de REVELO.*

*Post la tagmanĝo ni vizitis proksiman kavernon, rigardis stalakmitojn, stalaktitojn kaj kun iom da fantazio ni malkovris en ili diversajn  gurojn, kiujn la naturo kreis en plurmiljara laboro: apron ekzemple kaj kastelon. Grandan laŭdon al nia gvidanto Kolja, kiu tre lerte klarigis ĉion!*

*Reveninte al la kunvenejo la tuta partoprenantaro de REVELO kaj REVELIDO grupiĝis por komuna foto. La sekva punkto de la tagordo nomiĝis: "kantado de la himno"! Nu, kelkaj voĉoj vere kantetis: "En la mondon venis nova sento..."; dum en alia angulo eksonis dupersona vira koruso: "Revolas mi al Westerland!", jen kanto de la fama germana muzik- grupo "Die Ärzte", esperantigita de Christof Krick. Unu programero altiris ĉiujn partoprenantojn de ambaŭ eventoj: la vizito de la fama bierfarejo kun posta gustumebleco. Iu stranga vagonaro veturigis nin tra la produktejoj, kiuj al mi ŝajnis tute sterilaj, parte preskaŭ dezertaj, forlasitaj. Nur unufoje videblis laboranta persono, kiu evidente observis la procedon de la bierfarado sur diversaj komputilekranoj. Iel mankis al mi ankaŭ la tipa odoro de estiĝanta biero, sed eble mi simple havis iom tro romantikajn imagojn pri tiaj aferoj...*

*Rigardon al la horloĝo: Se mi volas atingi la planitan feston en Dortmund ĝustatempe, mi devus forlasi la aranĝon NUN. La etoso tamen estis tiom bela, ke mi preferis iri kun la aliaj al la gastodomo de la bierfarejo. Mi poste ankaŭ preterlasis duan buson, ĉar la prezentado de la magiisto DON ESPERO min allogis nerezisteble...*


*Nur longe post la noktomezo mi  ne atingis la hejmon de mia fratino. La festo ĵus estis  niĝinta. Sed egale! Mi ege ĝuis la tagon en Warstein kaj diras:*

*"Ĝis revido, REVELIDO!"*


Da bekommt man direkt wieder Lust auf ein echtes Esperanto-Tre en. Wie naiv die Leute damals waren! Wie unbeschwert sie ohne FFP2-Schnäbel vorm Gesicht durch die Weltgeschichte taumeln konnten! Aber Kopf hoch, auch 2021 geht irgendwann vorbei. Wenn es soweit ist, wollen wir das gemeinsam mit euch feiern ... in Wittenberg ... beim JES 2021/'22!

Bis dahin sind hier ho entlich alle durchgeimpft und haben ihre Esperanto-Sprachkenntnisse dank Bill-Gates-DNA-Chip auf die neueste Version geupdatet. Weitere Infos zum kommenden JES  ndet ihr auch immer auf der Webseite (jes.pej.pl), auf Facebook/Instagram sowie in der zugehörigen Telegram-Gruppe (jes.telegramo.org). Anmelden könnt ihr euch voraussichtlich schon ab Ende Juni.


Passend hierzu können wir nochmal kurz in den DeLorean steigen, etwas kräftiger aufs Gaspadel treten, und diesen wundervollen handgemachten Werbe yer aus dem Jahr 1972 bestaunen. Bitte ersetzt gedanklich beim Durchlesen „IS" einfach durch „JES" und „27 dec. 1972 ĝis 3 jan 1973" durch „28 dec. 2021 ĝis 4 jan. 2022":



# Al la 12 partoprenantoj la unua reta KEKSO tre plaĉis!



**Michaela:** „Organizi KEKSOn la unuan fojon en la reto estis certe defio kaj oni devis pripensi manieron, kiel oni kune kreu kreemajn kaj amuzajn cirkonstancojn. En unua organiza kunsido estis decidoj pri la dato kaj la daŭro de la reta evento. Dufoje po tri horoj en la posttagmezo al ni ŝajnis konvena kaj ne tro longa tempo antaŭ la komputilo. Kaj la ebleco resti pli longe en la reta ĉambro estis uzita de la partoprenantoj. Dum la programo de la dua tago la partoprenantoj havis tempon por priskribi siajn spertojn dum KEKSO. Legu mem:“



**Annika:** „Jam la semajnon antaŭe ni ricivis pakaĵon, kiu enhavis ĉion, kion oni bezonas por vera KEKSO: dolĉaĵoj, teo, kaj kompreneble – keksoj!

Sabato komenciĝis per interkona ludo, dum kiu ni eksciis pri la plej ŝatataj aferoj de la aliaj partoprenantoj. Poste okazis lingvokurso kaj diskutrondo pri rezist-movadanoj (la oka de majo ja estas taŭga tago por tiu temo).

Dum ludorondo ni multe desegnis: Unue ni ludis teaman ludon, dum kiu unu homo de ĉiu teamo devas desegni vorton kaj la aliaj devas plejeble rapide diveni, kio estis la vorto. Poste ni ludis GarticPhone, ludon, dum kiu oni devas desegni kaj priskribi la artaĵojn de aliaj homoj (vidu ekzemplojn en la fotokompilo). Tiel ekestis tre amuza ĉeno de desegnaĵoj, ĉar oni ne ĉiam povas bone diveni, kion desegnis la antaŭulo.

Sabatvespere ni "kune" (almenaŭ preskaŭ samtempe) kuiris, la ingrediencojn ni ankaŭ ricevis poŝte. La komuna manĝaĵo estis preskaŭ kiel dum la surloka KEKSO.

Mi ege ŝatis la komunan kuiradon kaj manĝadon, estis bongusta manĝaĵo kaj estis amuze vidi la kuirejojn de aliaj homoj ;)

Bona afero pri reta KEKSO estas, ke oni povas dormi en la propra lito kaj ne surplanke. Tial almenaŭ mi estis sufiĉe maldormema la duan tagon, malsame ol dum antaŭaj KEKSOj. La dua tago komenciĝis per rakontoj pri komenco, kiujn laŭtlegis Jani. Poste denove estis kurso kaj la spertaj parolantoj vizitis la TEJOejon en la retpaĝo GatherTown.“



**Danny:** „Mi tre ŝatis ludi „Gartic Phone“ kun ĉiuj. Estis amuze vidi la rakontojn, kiuj rezultis.“

**Jonas:** „Mi ankaŭ tre ŝatis la ludon „Gartic Phone“. Multa peno estis farita por la reta KEKSO. Estis multaj bonaj ideoj, kiuj ankaŭ estis bone efektivigitaj. La lingva kurso estis tre bone klarigita.“



**KEKSOano:** „Mi tiras mian ĉapelon al la organizantoj! La interkonatiĝo estis tre originala, kaj la ludorondo bonege elpensita. Ankaŭ eldoni receptojn al ĉiuj kreis ligon, ĉar mi certe sendos al vi fotojn de miaj kreaĵoj :)

La dikutorondo ne temis pri tre ĝojplena afero; tamen ĝi donis al ni la okazon paroli pri grava peco de historio kaj tiel mi komprenis kiel (mal-)bone mi kapablis esprimiĝi en Esperanto. La fabeloj estis simpatiaj, nek tro kompleksaj nek tro simplaj (tamen, se Jani estus havanta pli bonan interretan konektadon, ili estintus pli kompreneblaj :p ).“

**Michaela:** Mi tre ĝuis sperti, ke la ideoj, kiujn ni havis por la programo, plaĉis al ĉiuj. Pro tio, ke ĉiun programeron gvidis alia persono, estis ne tro granda laboro por unuopuloj kaj kreiĝis bunta programo, kiu certe restos en niaj memoroj. Mi dankas al ĉiuj partoprenantoj, kiuj kontribuis al la unua reta KEKSO, kaj se ne eblos persone renkontiĝi en aŭtuno, mi jam antaŭĝojas la sekvan.

Por mem sperti iom de la KEKSO-etoso, jen sekvas por vi la recepto de la fungo-rizoto, kiun ni kune kuiris, kaj la kolektitaj veganaj receptoj por keksoj kaj kuko:

# Kvin veganaj receptoj

## Vegana fungorizoto /veganes Pilzrisotto

**Fonto: *https://veganmom.de/veganes-pilzrisotto/*, tradukita de Michaela. Sufiĉas por plenkreskulo kaj infano (1,5 porcioj).**



**Ingrediencoj**

- 1 cepo
- 1 eta ajlodento
- Oleo por friti
- 130 g da rizotorizo
- 1,5 supkuleroj da buljono + 500 ml da akvo
- 150 g fungoj (ekz. brunaj ĉampinjonoj)
- 1 eta manpleno de freŝa petroselo
- 1-2 supkuleroj de gistoflokoj

**Kuirado:** 1. Fajne tranĉi la cepon kaj la ajlon, kaj friti en poto aŭ pato ĝis ili iĝas vitrecaj. 2. Aldoni la rizotorizon por ankaŭ iom friti ĝin (eblas jam kun la buljono). 3. Aldoni la duonon de la akvo (250 ml) kaj lasi ĉion kuireti (kun kovrilo) dum 20 minutoj. 4. Senakvigi la fungojn el la ladskatolo kaj aldoni ankaŭ ilin. 5. Iom post iom aldoni la reston de la akvo, ĝis la rizo estas finkuirita. 6. La freŝan petroselon disigi per tondilo (eblas ankaŭ tranĉilo) kaj meti an la poton/paton. 7. Laste aldoniĝas la gistoflokoj al la preskaŭ preta rizoto. 8. Bone miksi ĉion kaj – bonan apetiton!

## Nigraj-blankaj keksoj (Paula)



**Ingrediencoj**

- 300 g da faruno
- 200 g da vegana butero
- 90 g da sukero
- 10 g da vanila sukero
- Iomete da salo
- 30 g da kakaopulvoro

**Preparado:** Miksu la farunon, la buteron kaj la sukerojn ĝis ĝi estas pasto. Prenu duonon da pasto kaj enmetu la kakaopulvoron. Malvarmigu la pastojn dum 20 minutoj en fridujo. Ruligu la du pastojn samgrandece kaj rektangule (20 x 40 cm). Metu unu de la rektanglaj pastoj su la alian kaj formu rulon (5 x 50 cm). Denove malvarmigu la rulon iomete. Tranĉu la rulon en diskoj (5 x 0,5 cm) Baku la keksojn proksimume 10-15 minutojn je 180 gradoj celsio.









## Marcipanaj keksetoj (Annika)



**Ingrediencoj**

- 200 g da marcipano
- 1 kulerego da amelo
- 2 kuleregoj da pomkaĉo
- 80 g da sukero
- 110 g da faruno
- 100 g da muelitaj migdaloj
- 1 kulereto da cinamo
- 2 kuleregoj da Amaretto (vi ankaŭ povas uzi pomsukon)
- Iomete da salo

**Preparado:** Pecigu la marcipanon. Miksu ĝin kun la aliaj aferoj kaj knedu ĝis ĝi iĝas homogena pasto. Hejtigu la fornon al 175°C. Formu ĉ. 25 malgrandajn bulojn el la pasto kaj metu ilin sur bakladon. Prenu forkon kaj uzu ĝin por stampi etajn sulkojn. Baku dum 12 ĝis 15 minutoj.

## Veganaj ĉokoladaj trufoj (Colas)



**Ingrediencoj**

- Nigra ĉokolado, 200 g
- Kakaopulvoro (vegana), 30 g
- Suko de kokoso, 3 supkuleroj
- Migdallakto, 2 supkuleroj

**Recepto:** Rompu la ĉokoladon en pecojn. Fandu ĝin en kaserolo. Aldonu sukon de kokoso kaj miksu. Varmigu la migdallakton kaj aldonu tion al la resto. Post kiam la pasto malvarmiĝis, lasu ĝin en fridujo dum 40 minutoj. Formu bulojn el la pasto per supkulero. Rulu illin en la kakao.

## Ĉokolada kuko (de Paul adaptita)




**Ingrediencoj**

- 200 g da faruno
- 35 g da kakaopulvoro
- 180 g da sukero
- (60 g da hakitaj migdaloj)
- Duona pakaĵo da bakpulvoro
- Unu pakaĵo da vanila sukero
- Salo (iomete)
- 240 ml da akvo; 100 ml da neŭtrala oleo

**Recepto:** Miksu la sekaĵojn, enmiksu la malsekaĵojn por havi homogenan paston. Grasigu 20-centimetran bakformon kaj varmigu la fornon al 180°C (supra-malsupra-hejto). Baku por ĉirkaŭ 40 minutoj. Tiu kuko estas bone uzebla kiel tortobazo.

# Pri mia vivstilo, klimatprotektado kaj la ligo al la Esperanto-movado




**Grava kaj laŭ mi ĉiam pligraviĝanta temo estas – kiel la homaro povas vivi sur la terglobo sen komplete detrui ĝin por ontaj generacioj aŭ eĉ por nun kun ni vivantaj bestoj kaj plantoj.**

En mia ĉiutaga vivo mi ofte pripensas, kiel eblas plibonigi proprajn kutimojn por daŭripove agi kaj vivi. Mi povas fiere diri, ke mi ne posedas aŭton kaj veturas per biciklo al mia laborejo. Kaj pro la amaso de rubaĵoj, kiujn mi preterpasas survoje, mi komencis ĉiutage kunporti kelkajn pecojn de rubaĵoj ĝis la sekva rubujo. Bone, mi estas skolto kaj mi diras: Unu bona ago ĉiutage helpas por postlasi la mondon pli bona, ol mi trovis ĝin. Sed ne por ĉiuj ekzistas tiu ebleco, loĝi sufiĉe proksime al la laborloko. Kaj mi ne nur konas la vivon en granda urbo, kie ĉiuj gravaj lokoj estas en bicikle atingeblaj distancoj, sed ankaŭ la vivon en eta urbo, kie viaj ebloj sen aŭto estas ilimigitaj.

Krome mi pensas, ke mi estas en epizodo de mia vivo, en kiu ne bezonatas aŭto por povi rapide atingi multajn lokojn sinsekve, ekzemple por organizi hobiojn de familianoj. Komprebeble foje mi bezonas helpon de konatuloj kun aŭto, por povi transporti grandajn objektojn, sed por normalaj aĉetumadoj mi nur bezonas biciklajn sakojn. Espereble ankoraŭ longe mi ne bezonos aŭton, tio ja ankaŭ ŝparas monon, ne nur emisiojn.

Mia plej noja projekto estas „Foodsharing"(*foodsharing.de*) – asocio, kiu helpas al (super-)bazaroj, restoracioj kaj bakejoj ne forĵeti troajn ne vendatajn manĝaĵojn, kiujn ankaŭ la helporganizoj por nepagipovaj ne povas plene disdoni. Mi rete registriĝis, kaj por povi savi manĝaĵojn, devis lerni kelkajn regulojn, trapasi kvizon kaj lerni pri la etiketo por rajti savi manĝaĵojn en superbazaro. Jam pli longe mi konis tiun movadon kaj profitis de amikino, kiu antaŭe jam komencis savi. Oni kelkope dividas la varojn, forportas ilin ekzemple per bicikla remorko, prenas de tio, kiom oni povas foruzi aŭ manĝi, antaŭ ol ĝi nemanĝebliĝas, kaj plu disdonas la reston. Ĉio devas senmone okazi kaj kiel savanto oni transprenas la respondecon pri la kvalito de la varoj. Ĉiukaze oni helpas malpligrandigi la amason de senmakulaj, bonkvalitaj kaj ankoraŭ freŝaj manĝaĵoj, kiuj pro miskalkuloj de aĉetantoj, aŭ pro alveno de novaj varoj, estus forĵetataj en la rubujon. Laŭ mi tre inda celo, por kiu mi kunaktivas.

Krome mia koramiko kaj mi planas dum niaj ferioj veturi bicikle dum pluraj tagoj, kaj revoje uzi etajn trajnojn, kiel Esperanto-parolantoj kutimas karavane atingi ne tro forajn renkontiĝojn. Ĉu mi nun iĝu ano de BEMI (*bemi.tejo.org*) kaj IFEF (*ifef.free.fr*)? Indas pripensi tion, ĉu ne?

Kiel oni povas kombini klimatprotektadon kaj Esperanton, ni ankaŭ diskutis dum KEKSO. Paula opinias: "Klimata justeco konektas klimatan kaj median protekton kun aliaj aferoj kiel homaj ratoj, sociala justeco, mondvasta justeco inter la landoj, feminismo kaj paco. Ĉar oni ne povas trakti tiujn aferojn sole, oni devas trovi komunan solvon. Por atingi klimatan justecon, oni devas retiĝi, oni devas labori kune. Esperanto ebligas la konektadon de homoj mondvaste. Tiel la retiĝo inter la homoj facilas kaj labori por nia unu mondo pli bone funkcias. Dum Esperanto-renkontiĝoj oni povas interŝangi ideojn, informojn kaj projektojn pri atingi pli da klimata justeco."

Kaj Annika mencias: „Per Esperanto ankaŭ eblas havi pli rektajn informojn pri la konsekvencoj de klimatŝanĝiĝo. Oni povas rekte paroli kun esperantistoj en aliaj mondregionoj, kie jam pli sperteblas la ŝanĝiĝo, ol ĉi tie. Kaj por vojaĝi klimatneŭtrale oni povas per trajnkaravano iri al Esperanto-renkontiĝo. Tiel oni jam dum la vojaĝo renkontas esperantistojn kaj povas ĝui la kongresecan etoson." - „Ankaŭ eblas biciklokaravano de BEMI exemple al IJK.", aldonas Paula.

Do kiam denove eblos viziti Esperanto-amikojn, mi klopodos uzi biciklon kaj trajnon, por vojaĝi kaj dum parolado scivolos pri iliaj spertoj kun klimatŝanĝiĝo kaj iliaj kutimoj. Kaj ĉu ne estas tiel, ke en la Esperanto-movado (almenaŭ mi konas tion de junularaj aranĝoj) mutaj homoj manĝas vegetare aŭ vegane (ekz. dum KEKSO ni kutime manĝas vegane)? Eble ankaŭ ili nur mendas vegetaran manĝon de la ejo, por ne ricevi viandaĵojn ĉiutage. Tiel mi ofte faris. Dum la fastotempo ĉi-jare mi manĝis tute vegetare kaj viando ne mankis al mi, kaj mi ekkonis denove multajn bongustajn vegetarajn pladojn. Intertempe mi ne plu aĉetas viandaĵojn. Kelkfoje, kiam neniu volas preni de mi savatan viandon de Foodsharing, mi manĝas tion. Pli bone manĝi ol forĵeti! Kaj ankaŭ la viandon de sovaĝaj bestoj (aproj aŭ kapreoloj), kiujn ĉasis la patro de mia koramiko, mi ne rifuzas. Ĝi ja havas tute alian kvaliton kaj originon ol ekzemple porkaĵo el amasproduktejo.

Vestaĵojn mi prefere ne aĉetas en la kutimaj butikoj, sed en socialaj vendejoj, kie jam portitaj vestaĵoj estas malmultekoste vendataj de handikapuloj (ekz. fairkauf).

# Interlingvistikaj Studoj en AMU

**Se vi volas havi solidajn sciojn pri esperantologio kaj interlingvistiko, aŭ profesiiĝi pri instruado de Esperanto, partoprenu la sekvan grupon de la Interlingvistikaj Studoj en AMU, Poznano (Pollando), en 2021-24.**

Tiun eblecon ofertas nur la Adam Mickiewicz Universitato (AMU) en Poznano, unu el la plej signifaj polaj universitatoj ekde 1998. La 3-jara postdiploma studado servas por **internacia** publiko. La kursaron gvidas Ilona Koutny kaj kontribuas elstaraj esperantologoj kiel Vera Barandovska-Frank, Tomasz Chmielik, Nicolau Dols, István Ertl, Michael Farris, Sabine Fiedler, Aleksander Korĵenkov, Katalin Kováts, Aleksander Melnikov, Ida Stria kaj Humphrey Tonkin.

La **Interlingvistikaj Studoj** provizas unuflanke la bazojn de ĝenerala kaj aplikata lingvistiko, kiuj estas necesaj por konvene loki Esperanton inter la naturajn lingvojn, aliflanke prezentas planlingvojn, el kiuj Esperanto elkreskis. La internacia kaj interkultura komunikado, por kiu Esperanto estis kreita kaj kie gi bone funkcias, estas en fokuso. La Studoj koncentriĝas pri gramatiko, literaturo, kulturo kaj historio de Esperanto. En la tria jaro eblas **specialiĝi** pri komunikado, lingvistiko, literaturo, tradukado, planlingvistiko, aŭ pri lingvopedagogio. La **metodika formado** de la Studoj gravas por la instruista trejnado – al kiu eblos aparte aliĝi. En tiu ĉi tereno ekde la studjaro 2007/08 realiĝas kunlaboro kun ILEI kaj kun Edukado.net. Jen unika ebleco akiri universitatan atestilon por Esperanto-instruistoj.

La semestroj komenciĝos per 5-tagaj **intensaj sesioj** kun kvar studobjektoj (al ili aldoniĝos poste la ekzamenoj). Dum la semestro okazos ankoraŭ po du virtualaj semajnfinaj sesioj. Laŭ la planoj nur la septembraj sesioj estos surloke, la unua sesio en septembro 2021 dependos de la virusa situacio. La dua semestro komenciĝos en februaro. Post pretigo de finlaboraĵo kaj fina ekzameno la studintoj ricevos atestilon pri postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj, kiu validas 120 ECTS (eŭropajn studunuojn, same kiel la magistraj studoj).

Partoprenontoj el la tuta mondo povas aliĝi ĝis la **1-a de aŭgusto 2021** por la studoj. La unua sesio okazos inter la 21-a kaj la 25-a de septembro 2021. La sekvaj semajnfinaj sesioj fine de oktobro kaj komence de decembro.

**Postuloj:** diplomo pri superagradaj studoj kaj bona scio de Esperanto (min. B2). Partoprenontoj devas plenumi orientigan teston komence de la unua sesio.

**Kotizo** por unu semestro: 1800 PLN (ĉ. 400 EUR), en motivita kazo eblos peti redukton.

Kelkaj stipendioj estas antaŭvidataj dank' al ESF (Esperantic Studies Foundation).

**Pluaj informoj kaj aliĝilo**: *http://interl.amu.edu.pl; interlin@amu.edu.pl; http://pola-retradio.org/2021/04/e_elsendo-el-la-07-04-2021*

Ilona Koutny, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj

---

Ankaŭ meblojn el dua mano mi preferas. Kaj tio ĝuste nun okupas min, ĉar mi estas translokiĝanta kaj bezonas multan novan ekipaĵon.

Do ĉiam kaj ĉie mi ankoraŭ povas lerni pri novaj ebloj, malpli foruzi resursojn kaj plibonigi mian ĉirkaŭaĵon. Ofte tio ne estas la plej simpla vojo kaj oni devas serĉi kaj legi pri tio, resti en dialogo kun aliaj homoj kaj ne heziti demandi pri ideoj aŭ helpo por tiaj projektoj.

Kaj la temoj estas senfinaj: apartigo de rubaĵoj, reuzado de pakaĵoj, neaĉeto de pakaĵoj, regionaj kaj sezonaj produktoj, kiom da kaj kiamaniere generitan kurenton mi uzas, kosmetikaĵoj, paperaĵoj, unufoje uzeblaj aŭ reuzeblaj produktoj, eble mi ĉesu...

Ĉiu persono havas alian aliron al la ideo de klimat- aŭ natur-protektado kaj kompreneble malsamajn eblojn de efektivigo, sed mi certas, ke ĉiu, kiu volas ŝanĝi sin kaj siajn kutimojn, povas iomete plibonigi la mondon, kaj eble influi la pensmanieron de homoj en sia ĉirkaŭaĵo kaj iom post iom de la socio.

Se vi interesiĝas pri interŝanĝo de spertoj, aŭ havas bonan konsilon por mi, mi tre ĝojus pri komento de mia teksto al *michaela.stegmaier@esperanto.de* – kaj eble mi daŭrigos skribadon pri tiu-ĉi temaro. Dankon, ke vi legis tiun-ĉi tekston kaj tiel estimas mian mensan laboron kaj la klopodon plibonigi min.

**Michaela Stegmaier**

# Esperanto-enketo por mia faklaboro

**Bonan tagon!**

**Mi estas Jonathan, en la deka klaso, kaj lernas Esperanton ekde unu kaj duono de jaro. Por la lernejo mi skribas faklaboron pri Esperanto. Por la praktika parto mi kreis malgrandan enketon. Mi tre ĝojus, se vi prenus iom da tempo kaj respondus la mallongajn demandojn:**

1. En kiu aĝo vi ekparolis Esperanton?
2. Kial vi ekparolis Esperanton?
3. Ĉu vi uzas Esperanton en via ĉiutago kaj kie?
4. Ĉu Esperanto estu la mondlingvo kaj kial?
5. Kion vi farus por pli bone konatigi Esperanton?

Bonvolu sendi viajn respondojn al la sekva adreso: *esperanto.enketo@gmail.com*

Mi ĝojas je ĉiu respondo. Dankegon pro via subteno!

Havu bonan tagon!

**Jonathan Lüdeking**






Interlingvistikaj Studoj en AMU, Poznano (Pollando).

